

M. 15090 : 1-2

FOLKLIVSARKIVET

Institutionen för folklivsforskning  
vid Lunds universitet

(översättn. 1 sid.)

Belgien


uppt. år 1952

Svar i LUF 85 rör. hästhöft och hästslak  
m.m. s. 1-2

Belgien

M. 15090: /.

13



FOLKLIVSARKIVET

Institutionen för folklivsforskning vid Lunds universitet

# REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Sidejo : 19, avenue Montjoie, UCCLE-BRUXELLES

A.S.B.L.  V.Z.W.D.

Asocio sen profita celo

Statutoj : Moniteur Belge N° 1154, 27-6-1936  
Belgisch Staatsblad

Forsendinto :

D-ro P. Kempeneers  
Prezidanto  
19, Avenue Montjoie,  
Uccle-Bruxelles.

Respondo al :

Al LA UNIVERSITATO DE LUND,  
La etnologia arkivo, Finngatan, 8

L U N D . (Svedujo)

Bruselo, la 21-an de Aprilo 1952.

TEMO : Esploro pri ĉevalviando kaj pri buĉado de ĉevaloj.

Estimataj Sinjoroj,

Laŭ la peto, kiun vi sendis en Februaro 1952 al nia Ligo, pere de la Sveda Esperanto-Federacio, ni aperigis en nia nacia gazeto "BELGA ESPERANTISTO", vian alvokon koncerne la esploron pri ĉevalviando kaj buĉado de ĉevaloj.

Ni resumas ĉi sube la informojn, kiujn ni ricevis de niaj sekcioj :

1. Kia estis antaŭe la opinio pri ĉevalviando kiel nutraĵo kaj kia ĝi nun estas ?

Ĝis antaŭ trideko da jaroj, la ĉevalviando estis konsiderata kiel malaltkvalita kompare kun la bova viando. Iom post iom tiu malfavoro malpliigis kaj nuntempe la ĉevala viando estas tiel ŝatata kiel la aliaj. Oni eĉ bredas ĉevalojn por la buĉado.

2. Ĉu la mortigado de ĉevalo, hundo kaj kato kaŭzis socian malhonoron, kaj kiel tiuokaze tio montriĝis ?

La mortigo de ĉevaloj por la konsumado ne estas pli malhonoriga ol la mortigo de aliaj bestoj destinitaj por la nutrado de homoj : bovoj, bovidoj, ŝafoj, porkoj.

Pri hundoj kaj katoj, tiuj ĉi ne servas por homa nutrado, krom kelkaj tre maloftaj esceptoj, kiuj estigas la naŭzon de la ordinaraj konsumantoj kaj la indignon de la bestamantoj. Leĝe tamen la konsumo de viando de kato kaj de hundo ne estas malpermesata.

Turnu, m.p.

3. Ĉu ekzistas speciala persono, kiu havis la taskon mortigi ĉevalojn, hundojn kaj katojn ? Kiel li nomiĝis kaj kiel li estis akceptata ?

Koncerne la ĉevalon, ĝin ne mortigas speciale komisiita persono, sed la sama buĉisto kiu mortigas la ordinaran brutaron.

La hundoj kaj katoj estas mortigataj ne por esti konsumataj, sed pro kialoj diversaj, ĝenerale kiam ili estas mal-sanaj, tro maljunaj, nedezirataj aŭ en nombro ekscesa.

4. Kiamaniere okazis la mortigado de tiaj bestoj ?

Oni mortigas la ĉevalojn ĉu per martelego, ĉu per kuglo-pistolo. Poste oni tranĉas al ili la gorĝon.

Por la hundoj kaj katoj, la homoj riĉaj sin turnas al bestokuracisto, kiu enŝprucigas al la bestoj narkotikon aŭ alian mortigan substancon. Ofte la bestoj estas dronigataj, batmortigataj aŭ mortpafataj.

Tie kie ekzistas rifuĝejo aŭ ekstermorganizaĵo de societo por protektado de bestoj, la publiko alkiutimiĝas konduki tien la hundojn kaj katojn pereigontajn; tie oni uzas ĉu la kloroformskatolon, ĉu la pistolon.

La rifuĝejo de Bruselo estas la sola institucio en Belgujo kie oni mortigas elektre, pere de aparato importita de Anglujo. La aliaj rifuĝejoj, administrataj de lokaj societoj, uzas la pistolon Flobert (kalibro 6 m/m), same kiel la 54 regionaj mortigoficejoj de la Societo por la Protektado de Bestoj.


En la vilaĝoj, kie ne ekzistas rifuĝejoj, la mortintaj katoj kaj hundoj estas enterigataj.

Ni esperas ke la supraj informoj utilos al vi por la esploro, kiun vi faras kaj ni prezentas al vi, Estimataj Sinjoroj, nian sinceran saluton.

Por REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA,

La Sekretario,

La Prezidanto,



D-ro P. Kempeneers,  
19, Avenue Montjoie,  
Bruselo.

Belgien

13

M. 15090.

FOLKLIVSARKIVET

Institutionen för folklivsforskning  
vid Lunds universitet

Enligt den begäran, som Ni sänt i februari 1952 till vårt förbund genom Svenska Esperantoförbundet, har vi publicerat i vår nationella tidning BELGA ESPERANTISTO Eder rundfråga angående hästkött och slaktning av hästar.

Vi meddela här nedan i sammandrag de upplysningar vi erhållit från våra sektioner:

1. Ända tills för ett trettiotal år sedan har hästköttet ansetts såsom mindervärdigt jämfört med nötköttet. Så småningom har denna missfavör dämpats och nuförtiden är hästköttet lika omtyckt som andra köttslag. Man uppföder till och med hästar för slaktning.
2. Dödandet av hästar för konsumtion är inte mer vanärande än dödandet av andra djur som användas till människoföda: oxar, kalvar, får, grisar. Vad beträffar hundar och katter, så tjäna dessa ej till människoföda, utom i några mycket sällsynta undantagsfall, vilka uppväcka äckel hos de vanliga konsumenterna och indignation hos djurvännerna. Någon lag som förbjuder konsumtion av katt- och hundkött finns dock inte.
3. Beträffande hästen, så har ingen särskild person uppdraget att döda den, utan det gör samme slaktare som dödar nötkreatur. Hundar och katter dödas ej för konsumtion, utan av olika orsaker, i allmänhet därför att de är sjuka, alltför gamla, ej önskvärda eller i för stort antal.
4. Man dödar hästarna antingen med en stor hammare eller med pistol. Sedan skäres halsen av på djuret. För hundarna och kattorna gäller att rika människor vänder sig till djurläkare som sprutar in narcotica eller något annat dödande ämne. Ofta dränker man djuren, dödar dem genom slag eller skjuter dem. Där det finns någon asyl eller utrotningsorganisation inom djurskyddsföreningen, brukar folk föra dit hundar och katter som de vilja ha avlivade.. Där användes än kloroform än pistol. Asylen i Brüssel är den enda anstalten i Belgien där man dödar elektriskt genom en apparat som importerats från England. De andra asylerna, vilka handhas av lokalföreningar, använda pistolen Flobert (6 mm kaliber), liksom de 54 regionala djurskyddskontoren. I byarna där det inte finns några asyl, begraver man de döda hundarna och kattorna.

Vi hoppas att ovanstående upplysningar sköla bli Eder till nytta för undersökningen som Ni bedriver och sänder Eder härmed vår uppriktiga hälsning.

Sekr.  
Z. SOYEND

För Kungl. Belgiska Esp-förb.  
Ordf.  
Dr P. KEMPENEERS